# La Riverego

Kebekia esperantista bulteno


ARE: vidpunkto de novulo............... 2
Avo Frosto denove respondas E-e ... 4
Ĉu ni konsideru Esperanton ?.......... 5
Kelkaj ciferoj ................................... 8
Normando Fleury ĉe ESF ................. 9
Recenze : Spitaj — kiel hidrargo ..... 11
Nova ondo da enmigrantoj :
Esperantistaj ! (parto 2).................. 14
Pepaĵoj ............................................ 20
Kiel traduki ..................................... 21




## Rememoroj pri ARE

## Souvenirs de l'ARE

# Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto, « recenzo » de novulo

*Jessica Grasso*

*Une nouvelle espérantiste raconte son expérience lors de l'ARE*

Ĉi tiu renkontiĝo okazis en belega loko, konstruaĵaro de la YMCA apud Silver Bay, NY. Estis, laŭ mi, taŭga loko, tamen multekosta. Oni tamen havis kelkajn elektojn por loĝi, manĝi, ktp., por ke homoj kun malsamaj deziroj kaj bezonoj povu ĝui la semajnfinon egale. Mi mem atingis la lokon aŭte post dekhora vojaĝo, kiun faciligis alia novjorka esperantisto, ne ĉi-jara partoprenanto, sed gastiganto de Pasporta Servo (dankon !). Mi venis vendrede, kaj dum kelkaj horoj sensukcese serĉis aliajn partoprenantojn. Ne tiom gravis, tamen, ĉar marŝado kaj esplorado de la ĉirkaŭa loko estis plaĉa post la longa vojaĝo.






Honeste, mi ja havis kelkajn dubojn tiunokte, sed ili estis forĵetitaj vespere kaj dum la venontaj tagoj, kiam homoj alvenis kaj kiam la renkontiĝo mem komenciĝis.

Aliaj diris, ke la renkontiĝo estis malpli granda ol dum antaŭaj jaroj, sed estis sufiĉe granda grupo (certe pli granda ol tiu en mia hejmurbo, kiu fakte ne ekzistas !). Ĉeestis kaj junuloj kaj maljunuloj, kaj kanadanoj kaj usonanoj, kaj spertuloj kaj komencantoj. Mi renkontis multajn homojn, kaj ja amikiĝis kaj daŭre komunikas kun kelkaj.

Dum la renkontiĝo ja estis programo, sed ankaŭ estis multe da libera tempo por simple ripozi, babili, ĝui

la naturon kaj la homojn, kaj fari kion ajn. Ni marŝadis en la arbaro, kajakis, ludis kaj ekstere kaj interne, kaj (nu, du kuraĝaj homoj) naĝis en la lago. Vespere okazis tabulludoj (kaj lingvaj kaj alispecaj), kaj ŝajnis, ke ĉiuj povis trovi ion interesan kaj partopreni. Mi bedaŭras, ke mi neniam ludis goon, post la aŭskultado de tre interesa prelego pri la ludo, kiun mi antaŭe ludis nur unu- aŭ dufoje kaj sen bona scio de la reguloj.




Se paroli pri la programo mem, estis kaj prelegoj kaj aliaj aktivaĵoj. Mi ĝuis ankaŭ la ludojn de la unua vespero, kiuj estis planitaj por ke homoj povu iom pli bone ekkoni unu la alian. La ludoj estis facilaj, sed pensigaj kaj ĝueblaj. La prelegoj havis diversajn temojn : instruado, ludoj, lernado, lingvoj mortantaj, kulturaj aferoj kaj aliaj.

Okazis kelkaj, ŝajne kutimaj, aferoj, kiujn mi, kiel novulo, ne antaŭvidis, do ne vere povis partopreni. Unue estis la literatura rondo, dum kiu homoj montris esperantajn librojn, kiujn ili legis lastatempe, kaj iom parolis pri ili. Mi ne kunportis libron, sed ja aŭskultis kun intereso, kaj fakte legis la rakonton *La Eta Princo* unuafoje (en ajna lingvo) pro ARE ! Due, okazis kelkaj kune preparitaj manĝoj en la dometo, dum kiuj estis bona, preskaŭ familia etoso. Ankaŭ, ŝajnas ke la programo pli-malpli samas de jaro al jaro, sed la organizantoj bonvenigis novajn ideojn kaj proponojn. La nova sperto estis bonvena, kaj certe mi estos pli preta pri la kutimaj aferoj kaj penos kontribui novajn, kiam mi partoprenos denove !

Por mi, ĉi tiu renkontiĝo estis aparte memorinda, ĉar ĝi fakte estis mia unua kelktaga renkontiĝo en Usono, kaj mi povis renkonti aliajn lokajn esperantistojn ! Mi esperas, ke mi povos vidi tiujn novajn amikojn denove, kaj ke mi havos multajn eblecojn partopreni en Nordamerika Esperantujo estontece! Mi certe partoprenos AREn denove kaj invitas aliajn fari same !

*Jessica Grasso loĝas en Pitsburgo, Usono.*

# Avo Frosto denove respondas en Esperanto !




*Le Père Noël connaît l'espéranto ! En 2002, le Père Noël (Avo Frosto en espéranto) de Postes Canada a appris l'espéranto. Donc, depuis cette année-là, les enfants espérantophones qui lui écrivent reçoivent tout naturellement une réponse dans cette langue. Au fil des ans, le Père Noël a répondu à plusieurs centaines d'enfants de près de 20 pays.*

La jarfino alvenas kaj, kiel ĉiun jaron, centmiloj da infanoj el Kanado kaj el la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj, kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj, ricevas respondon el la Norda Poluso. Denove en 2011, la infanoj, kiuj skribos al Avo Frosto Esperante, ricevos respondon en Esperanto.

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo proponante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperantlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK, kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto troviĝas inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj de liaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj, kiuj eklernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon, adreson, indiku 'ESPERANTO' por certigi respondon en la ĝusta lingvo. (Vidu la adreson ĉi-supre).



# Ĉu ni konsideru Esperanton ?

## (Artikolo diabla)

*Silvano* **La Lacerto** *Auclair*

***Dans son périple dans le royaume des langues construites, l'auteur s'intéresse aujourd'hui à… l'espéranto. Un article hors de l'ordinaire.***



Ni ĉiuj estas Esperantistoj. Ĉu tio signifas, ke ni estas kompetentaj paroli pri Esperanto ? En iuj rilatoj, certe[1]. Sed en aliaj, ne. Tio venas de la fakto, ke ni ĉiuj estas *sukcese lernintaj* Esperantistoj. Tiuj el ni, kiuj instruis Esperanton, scias, ke nur parto el la lern-provantoj fine aniĝas en nian grupon. Ĉu tiu fakto povas sciigi al ni pri Esperanto ? Verŝajne.

Dum mia nefiniĝinta vojaĝo inter la konstruitaj lingvoj, mi trafis la anglalingvan blogon de S-ro Robert Winter[2]. Tiu aŭstralia softfvarverkisto kaj romanisto volis lerni fremdan lingvon por kapabli verki literaturon en ĝi. Kvankam li samtempe lernas la francan (kaj iomete lernis la italan kaj germanan en lernejo), li konsentas kun Claude Piron, ke naturaj lingvoj estas tro malsimplaj por ludi tian internacian rolon. Esti anglalingva aŭstraliano certe ne helpas por lerni fremdajn lingvojn… Liajn spertojn oni tamen devus zorge konsideri por kompreni estuntajn esperantistojn.

En la komenco li havis tre altajn atendojn por taksi lingvojn. Li plej esperis, ke tiu lingvo estu… facila, rapide lernebla. Kvankam romanisto, li konsideris la situacion de estro de firmao, kiu devas rilati internacie. Ĉu tia homo povos dediĉi jarojn al lingvolernado ? Ne. Lingvo devus esti majstrata en monato. Ĝi sekve devus uzi internacie facile rekoneblajn vortojn kaj radikojn, kaj minimuman gramatikon. Nu, ni Esperantistoj ofte propagandas nian lingvon, asertante ke ĝi ĝuste posedas tiujn kvalitojn. Sekve S-ro Winter konsideris Esperanton. Post rapida eklerno (fakte, dum la jaro, kiun li dediĉis al tiu projekto, li venis al Esperanto almenaŭ kvar fojojn) li konkludis, ke la lingvo ne plenumas siajn promesojn.

## Ni ne plu reklamu, ke Esperanto estas facila

Kompreneble, ĉiuj konsentas, ke Esperanto estas pli facila ol la angla, la franca aŭ la rusa, ekzemple. Ol iu ajn nacia lingvo, fakte. Sed tiu ne estas granda atingo, ni devas konfesi. Fakte, normala Esperanta teksto povas montriĝi treege malfacila al komencanto.

Kiel preskaŭ ĉiu anglalingvano aŭ franclingvano, li trovis la akuzativon malfacila, kaj ankaŭ same la akordon de adjektivoj kun substantivoj. Li perdiĝis en la libera vort-ordo — malgraŭ la akuzativo. Li neniam sukcesis regi la tabelvortojn (kio tamen pli mirigas min). Sed kio pli forpelis lin, estas la eblo krei vortojn el radikoj kaj afiksoj.

Ĉar tio estas, laŭ pluraj, unu el la fortoj de Esperanto, mi ekzempligu. Legante tekston, S-ro Winter volas kapabli uzi vortaron por precize kompreni vortojn. Li iam trafis la vorton *laboregi*. Li tute bone analizis la vorton, sed tamen demandis sin : ĉu labori intense, ĉu labori longe, ĉu labori ĉe granda projekto, ĉu labori kontraŭ alta salajro ? Al bona Esperantisto, tiuj demandoj ŝajnas iom stultaj, kaj ni komprenas la vorton laŭ la kunteksto. Sed S-ro Winter ne akceptis tion : li postulis vortojn klarajn, ne dubsencajn. Eble li ne havas tian menson, kiu povas vivi kun tia necerteco ; eble li iam komprenus ĝin, se li pli longe lernus. Sed la fakto estas, ke li **ne** pli longe lernis. Tiaj trajtoj de Esperanto forpelis lin.

Kompreneble, se iu registaro devigus lin lerni Esperanton, li verŝajne kapablus. Generacioj da kleruloj lernis la latinan kaj la francan, kaj Esperanto certe estas pli facila. Sed li multe preferus, ke artefarita lingvo disvastiĝus dank' al siaj kvalitoj, ne pro zorga propagando ĉe potenchavuloj. Same mi, fakte.

Nu, ne nur malfacileco forpelas eblajn lernantojn. Mi memoras virinon, kiu koleriĝis kaj poste malaperis, kiam ŝi lernis la vorton *patrino* ; ŝi ne povis akcepti, ke tiu vorto derivas el *patro*. Mi ankaŭ antaŭnelonge legis pri iu, maldekstrulo[3], kiu ne ŝatis, ke la dekstra mano ĝuu pli da fundamenteco ol la maldekstra. (Kaj kiom da radikoj ni fakte ŝparas dank' al tiu prefikso *mal-* ? Kelkdek ? Neniom rilate al tuta vortaro.)

## Ĉu Esperanto malhelpas al la ideo de internacia lingvo ?

Kio pli tuŝis S-ron Winter — kaj mi kredas, ke ankaŭ ni esperantistoj devus maltrankviliĝi pro tio — estas, ke tiu malfacileco de Esperanto fakte malhelpas al la tuta afero de solvo de la internacia

lingvoproblemo per artefarita lingvo. Esperanto estas tiel superrega en tiu kampo, ke ĝia nomo preskaŭ signifas LA artefaritan internacian lingvon. Sekve, ĉiuj malkuraĝiĝintaj Esperanto-lernantoj tute perdas fidon en la ebleco komprenigi la diversajn popolojn per neŭtrala lingvo. Do, ĝi malhelpas la… esperantismon[4].

Kompreneble, S-ro Winter ne malkuraĝiĝis pro tio. Li papiliesploris multajn lingvojn, kaj finfine pli interesiĝis pri interlingua aŭ occidental (estas iom malfacile sekvi liajn ofte ŝanĝiĝantajn elektojn), lingwa de planeta kaj sambahsa-mundialect, t.e. lingvoj vortare tre similaj al naturaj lingvoj, kvankam almenaŭ interlingua kaj sambahsa-mundialect estas laŭ mi pli malfacilaj ol Esperanto. Ĉiuj tiuj lingvoj tamen havas ol Esperanto pli rigidan vortordon, kaj ili pli kongruas kun lia literatura sento kaj emo al… vortara fideleco, ni diru ; per tio, mi volas diri, ke kreado de novaj vortoj per kunmetado estas pli limigita ol en Esperanto : se vi deziras novan vorton, vi ne povas simple krei ĝin per kunmeto de elementoj ; vi devas fari kiel en naturaj lingvoj.



La Babela turo (1563), de Pieter Bruegel la Maljuna

## Esperanto estas aparta

Kion konkludi el tio ? Ke Esperanto estas aparta lingvo. Multaj el ĝiaj ecoj, ĝia stranga mikso de logiko kaj libereco, la ebleco por ĉiuj krei novajn kunmetaĵojn kaj enkonduki eĉ novajn radikojn, igas ĝin kaj tre facila kaj tre bunta, kaj, ni ne hezitu uzi la vorton, malfacila. Eble ĝi kongruas nur kun iaj mensoj, kaj ne povos de si mem disvastiĝi en la tutan homaron. Eble la Raŭmistoj estis pravaj : *Lige kun la lasta valoro [novtipa internacia kulturo], ni emfazas ke la serĉado de propra identeco igis nin koncepti esperantistecon kvazaŭ la aparteno* [n] *al mem elektita diaspora lingva minoritato. La kresko de niaj fortoj kaj la aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciiĝo pri tiuj ĉi valoroj.*[5]

Eble ni devas agnoski, ke tiu novtipa internacia kulturo baziĝas sur novtipa *bona* lingvo, iom aŭ multe malsama ol la ĝisnunaj lingvoj, kaj ke iuj homoj povas preferi tradicie funkciantan artefaritan lingvon.

Ĉiuokaze, ni nenion povas fari rilate tion. Esperanto estas pli ol jarcentaj lingvo, literaturo, kulturo kaj *lingva diasporo*, kaj, eĉ sen la Fundamento, ne eblus ŝanĝi ĝin. Ni nur iom pensu pri tio, ĉu ĝi vere estas la internacia lingvo, dua lingvo por ĉiuj.

Sed ne traduku tion ĉi nacilingven !

*En la venonta numero: occidental aŭ interlingua (mi ankoraŭ ne decidis).*

1. Sekve, mi ne prezentos la gramatikon kaj vorttrezoron de Esperanto…

2. La blogo de R. Winter : joyoflanguages.blogspot.com

3. Ni rimarku, ke tiu vorto signifas kaj *uzanton de la maldekstra mano* kaj *anon de maldekstra politika partio…*

4. *La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu « ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn » donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon komprenigâdi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povas esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.* (L. L. Zamenhof, Deklaracio pri Esperantismo, unua paragrafo, 1905)

5. El la *Manifesto de Raŭmo,* 1980.

## Kelkaj ciferoj

***Sylvain Auclair, kasisto***

***Le nouveau trésorier présente la très bonne — peut-être trop bonne — situation financière de la Société.***

Post kelkjara paŭzo, mi denove iĝis kasisto de la Societo, kaj antaŭnelonge finis pretigi la financan raporton pri la jaro finiĝinta la 31-an de majo. Mi ne longos ĉe detaloj. Sufiĉas diri, ke la jaraj agadoj profitis je preskaŭ 1000 $* kaj ke ni tenas ĉirkau 10 000 $-jn kiel monon. Estas evidente, ke nia veto ne plu peti jaran kotizon kaj sendi *La Riveregon* nur retpoŝte donis sian rezulton, almenaŭ finance. Nu, oni povus demandi sin, ĉu ni ne havas **tro** da mono. Nia celo estas disvastigi Esperanton, ne akumuli monon. Sed por tio ni bezonas bonajn ideojn kaj laborfortojn por plenumi ilin. Dekmil dolaroj tamen ne estas tiom da mono, ke ni povus dungi homojn aŭ okazigi profesian varbkampanjon…

* Fakte, ni profitis eĉ pli ol tio. Pro eraroj dum la lastaj jaroj, kiuj kondukis al subtakso de la enspezoj aŭ trotakso de la elspezoj, aŭ ambaŭ (mi ne ĝisfunde esploris, nur ĝustigis), mi devis aldoni enspezon, nomatan *korekto de eraroj de pasintaj jaroj*, valoran je preskaŭ 1500 $ !

*Redakcio : Dum multegaj jaroj Silvano sindone, kaj tre kompetente, kasistis ĉe ESK. Pro tio, ke, post ioma interrompo, li reprenas sian iaman taskon, ni povas nur lin dankegi.*

# Normand Fleury nomumita al la ESF-Konsilantaro

***Notre président Normand Fleury vient d'être nommé membre du Conseil de l'Esperantic Studies Foundation. Cette dernière désire élargir le champ d'action de lernu.net et renouveler le format de NASK (Nord-amerika somera kursaro — cours d'été célèbre donné aux États-Unis depuis plus de quarante ans). Pour l'aider dans cette tâche, elle fait appel à des personnes d'expérience, telles que M. Fleury, très actif dans le monde de l'espéranto depuis le début des années quatre-vingt.***

**Esperantic Studies Foundation (ESF) anoncis la nomumon de la prezidanto de ESK, Normando Fleury, al sia Konsilantaro. Liaj tridek jaroj da sperto pri organizado kaj mastrumado de Esperanto-eventoj kaj aktivaĵoj tre riĉigos la « homan kapitalon » kaj la ekspertizon de la Fondaĵo.**



Normand Fleury lernis Esperanton en 1979. Kun-fondinto de la Esperanto-Societo Kebekia (1982) kaj ĝia estrarano ekde tiam, li ankaŭ estis aktiva en la Kanada Esperanto-Asocio (interalie, mastrumante ĝian libroservon ekde 1984). Krome, li estis prezidanto de LKK por la IJK de TEJO en 1992 kaj la ĉeforganizanto de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en 2008 en Montrealo, kaj ankaŭ kreinto kaj gvidanto de pluraj regionaj renkontiĝoj. Normand diplomiĝis pri hortikulturo kaj pejzaĝplanado kaj laboras kiel teknikisto pri verdigo kaj parkoj por la urbo Montrealo.

La nomumo de Normando estas jam la dua nomumo al la Konsilantaro ĉi-jare. Ĝi estas parto de strebo alporti al ESF diverskampajn spertulojn, kiuj dividos siajn sciojn kaj povos konsili pri la grandigo de Lernu.net (tio inkluzivos, interalie, faciligon de aĉetoj, vendoj, abonoj, eventoj kaj donacoj) kaj ŝanĝon de la formato de NASK (Nord-Amerika Somera Esperanto-Kursaro), kiu faros ĝin alirebla al kiom eble plej vasta gamo de studentoj el Nord-Ameriko kaj tutmonde.

Pli da informoj pri grandigo de Lernu:
http://esperantic.org/eo/komunikado/novaĵoj?n=57

[Esperantic.org]

## Letero de la ESF-prezidanto

*Kara Amiko,*

*Antaŭ dek jaroj Esperantic Studies Foundation (ESF) financis grupon de entreprenemaj gejunuloj por fondi la retejon Lernu.net. Ni estis konvinkitaj, ke tio helpos al la nova generacio lerni Esperanton, kaj tiel ni povos konektiĝi kun homoj, kiujn ni ne povus atingi antaŭe.*

*Sed la sukceso de tiu ĉi iniciato superis ĉiujn niajn atendojn. Lernu fariĝis vigla reta komunumo kun pli ol 106 mil uzantoj (kaj la nombro daŭre pligrandiĝas), kun pli ol cent mil paĝrigardoj ĉiutage ! Hodiaŭ la retejo estas konata ĉie tra la mondo : fakte,* ***estas uzantoj de Lernu en 240 landoj kaj teritorioj !***

*Esperanto prosperas en la reto kiel neniam antaŭe, aparte en Eŭropo kaj Ameriko. Dank' al Lernu.net, homoj de la tuta mondo povas lerni Esperanton senpage, sperti nian kulturon kaj fariĝi parto de la komunumo. Oni lernas Esperanton ankaŭ en landoj, kie ne ekzistas landaj asocioj aŭ tradiciaj kursoj. Pluraj Lernu-uzantoj fariĝas aktivaj ankaŭ en la tradicia Esperanto-movado, kaj la ĉiujara Lernu-renkontiĝo fariĝis unu el la plej grandaj Esperanto-eventoj.*

*Tiu ĉi sukceso ŝuldiĝas multe al entuziasmo, talento kaj miloj da horoj da volontula laboro. Sed Lernu (kaj aliaj retaj projektoj) ne estus ebla sen la granda investo de ESF. Fakte, ni subtenis ĝin ekde la unua plan-fazo, tra ĝia tuta kresko kaj sukceso, doninte pli ol kvaron-miliono da usonaj dolaroj ĝis la fino de 2010.*

*Nun, kiam alproksimiĝas la 10-a datreveno de Lernu, ni kredas ke ĝi havas eĉ pli da potenco por kresko.* ***Lernu nun estas refarata por fariĝi finance memstara.*** *La nova Lernu provizos gamon de novaj servoj por faciligi aĉetojn, vendojn, abonojn, eventojn kaj donacojn inter individuoj kaj grupoj. Tiuj servoj estos disponigitaj ne nur al la Lernu-uzantoj, sed ankaŭ al tradiciaj Esperanto-organizoj kaj al ĉiuj, kiuj parolas kaj uzas Esperanton, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj simple volas subteni la lingvon. Ni esperas, ke tiu ĉi paŝo ankaŭ instigos la integriĝon inter la reta*

*komunumo kaj la landaj kaj lokaj Esperanto-asocioj kaj organizoj.*

*Kompreneble, la disvolvigo de Lernu bezonas sufiĉe grandan aldonan investon de ESF, kaj pro tio, ke la Fondaĵo subtenadas ankaŭ plurajn aliajn projektojn kaj iniciatojn, tiu tasko postulas komunan strebon grandigi la ESF-kapitalon. Kiel parto de tiu ĉi strebo, la organizo E@I (Esperanto@Interneto) lanĉis la donac-kolektan kampanjon 100 000 eŭroj por ESF.*

*En lastatempa intervjuo la vic-prezidanto de ESF Mark Fettes notis : « Kun la reta epoko, nia mondo malkreskis, kaj multege kreskis la eblecoj rapide komuniki, decidi kaj agi. Iom post iom nia tuta movado devos adaptiĝi al tio, sed ESF jam montras la vojon, subtenante promesplenajn iniciatojn sur la kampoj de edukado, scienco kaj teknologio.* ***Se vi donacos al ESF, vi povos esti certa, ke via mono uziĝos por konkretaj projektoj, bone mastrumataj, kiuj altigos la prestiĝon, videblecon, kaj uzindecon de Esperanto en epoko de tutmondiĝo. »***

*Ni petas vin konsideri fariĝi ESF-donacanto. Vi povas donaci unufoje aŭ ĉiumonate, per la reto aŭ per la ĉeko. Kiel donacanto, vi estos rekonita sur nia virtuala « Muro de Donacantoj » de nia retejo.*

*Por lerni pli, vizitu nian retejon : esperantic.org, aŭ la retejon de la kampanjo « 100 000 eŭroj por ESF » : kampanjo.ikso.net.*

*Amike,*
*Humphrey Tonkin*
*Prezidanto, Esperantic Studies Foundation*

**Donac-informoj:**
*UEA-konto :* ***esfo-p***

**Retaj donacoj :**
*Kampanjo « 100 000 eŭroj por ESF » :*
http://kampanjo.ikso.net

**Donac-paĝo de ESF :**
http://esperantic.org/eo/donacoj/rete

# Spitaj — kiel hidrargo :
# Strangega romano de Christian Declerck[1]



*Francisko Lorrain*

***Ce roman, dont le titre signifie* Récalcitrants — comme le mercure*, est fort étrange — par son contenu tenant autant du roman que de l'essai et par sa langue en partie expérimentale. Il n'est pas à tous égards réussi, mais vaut quand même la peine d'être lu.***

Declerck estas konata aŭtoro. Li jam publikigis du romanojn, *Kazinski venas tro malfrue*[2] kaj *Tarokoj kaj epokoj*,[3] kiujn mi bedaŭrinde ankoraŭ ne legis.

*Spitaj — kiel hidrargo* estas delonge la plej stranga romano, kiun mi iam ajn legis ! Ĝi estas fakte kaj romano kaj eseo. Ĝi estas verkita en la formo de prova romano verkata de juna aŭtoro, Marteno, mem rolanta en ĝi. Nu bone, kio strangas en ĉio tio ? Ja nenio. Kio strangas, estas ties stilo kaj, kelkrilate, la enhavo mem de la verko.

**Unue, pri la enhavo.** Disvolviĝas kvar ĉefaj temoj, kiuj en si mem neniel strangas.

A. La kreskanta uzado de la angla en reklamoj, nomoj de komercejoj plej diversaj, eĉ en la ĉiutaga lingvaĵo, en Belgujo. Declerck, same kiel liaj roluloj (krom malmultaj), estas flandraj belgoj, kaj la loko de la romano estas Antverpeno, inter 2004 kaj 2007. Franckanadanoj komprenos la spitemon de la aŭtoro rilate tiun iompostioman invadon de la angla en la ĉiutagan vivon, pri kiu ofte kulpas la belgoj (resp. franckanadanoj) mem. Kompreneble, tiu spitemo ne radikas en ia malŝato de la angla lingvo mem ! Nur ĝia pli kaj pli superrega pozicio en nia nuna mondo vekas amaron.

B. Esperanto. Tri el la roluloj, junaj homoj, instigitaj de jama Esperantisto, same juna, kune lernas Esperanton, pri kiu la aŭtoro liveras multajn informojn. Kompreneble, ĉi tiujn plejparte jam konas legantoj Esperantistaj. Sed, en noto fine de la libro, Declerck klarigas, kial li tion faris : li esperas, ke lia romano estos iam tradukita al iu aŭ alia nacia lingvo, kaj tial povus instigi homojn interesiĝi pri Esperanto. Ĉu traduko de ĉi libro ja povus helpi la Esperantan aferon ? Eble jes, tamen eble ne.

C. Nudeco kaj seksa agado en la homa vivo. Malsimpla temo, en kiu estas envolvitaj intensaj emocioj kaj motivoj, ofte memkontraŭdiraj, kaj sufiĉe malsamaj inter unu homo kaj alia. La aŭtoro kuraĝe esploras kelkajn regionojn de tiu malebenega kaj vasta mondo.

D. La politika/ekonomia stato de nia nuna mondo. Jen la esea parto de la verko, miaopinie multe malpli sukcesa ol la romana. Kvankam tiujn « eseojn », dissemitajn ie kaj tie, eldiras diversaj roluloj, ili miasente malbone integriĝas en la romano mem kaj tro evidente esprimas la penson de ununura persono : Declerck mem. En si mem, tiuj partoj de la romano ne malbonas : el ili oni povus tiri kelkajn legindajn artikolojn por iu serioza revuo. Sed, tiel rekte enŝovitaj en romanon, ili fariĝas predikecaj kaj, mi diru rekte, tedaj.




La personoj mem de la romano estas interesaj, tamen. Pluraj el ili agrable surprizas, per siaj nekonvenciaj diroj, agoj, reagoj. Ĝenerale, escepte la eseajn partojn, la romano estas stimula legaĵo.

Kelkaj dialogoj miasente tre malverŝajnas — ekzemple, kiam en unu loko parolas infano (7a-ĉapitre, pp. 122–126), aŭ kiam poste (8a-ĉapitre, pp. 128 ss.) vervege interparolas la kvar gejunuloj.

Kial *spitaj* ? Pro tio, ke ĉiuj personoj de la romano, kaj aldone la aŭtoro mem, pli-malpli spitemas rilate iun aŭ alian aferon, kaj ke tiu spitemo konsistigas gravan parton de ilia vivo, kaj iel kunigas ilin.

Kial *kiel hidrargo* ? La romano mem klarigas tion, komence de la dua ĉapitro.

La fino de la romano — ĉapitroj 9 kaj 10 — estas verdire ege stranga. Ĝi ne konvinkis min, ĉar ĝi ŝajnas al mi tro simpla, tro rapide disvolvigata. Krome en ĉapitro 10 akumuliĝas kelkaj el la pezaj eseoj, pri kiuj mi jam parolis…

**Due, pri la stilo.** La aŭtoro uzas *multegajn* neologismojn kaj evidente amegas ilin. Li tute rajtas, kompreneble. Tio tamen iom strangas, ĉar li videble lertas ankaŭ pri kunmetaĵoj. Nu bone, kial ne lerti ambaŭflanke ? Sed, sen troigo, mi pasigis preskaŭ tiom da tempo legante la libron mem, kiom trafosante la vortaron. La romano do ne celas mezajn Esperantistojn kiel mi. Sed mi estas pacienca

homo, kaj finfine la tuton tralegis.

La neologismoj en la libro troviĝas preskaŭ ĉiuj en NPIV, sed Declerck enkondukas kelkajn novajn, foje dubindajn, miaopinie, kiel en jena frazo de paĝo 191 :

> « La homo *humanizas* la objektojn sed la teknologio *deshumanizas* la interhomajn rilatojn. »

Oni ja pli-malpli komprenas. La aŭtoron videble allogis la kontraŭmeto de *humanizas* kaj *deshumanizas*. Sed la divenata senco de « humanizas » (homigi, homecigi) malkongruas kun la NPIVa senco de « humana » (« Posedanta la plej noblajn ecojn de la homo […] »). Mi dubas, ke Declerck per sia « humanizas » ja celis precize ĉi-lastan sencon. Kaj « deshumanizas » ne respektas la spiriton de Esperanto : ĉi-foje la senco de « human- » ŝajnas esti tiu de NPIV, sed tiam kial ne « malhumanizas » (« mal-human-iz-as »), aŭ, pli fundamente, « malhumanigas » ?

Cetere, kial uzi la sufikson « -iz- » anstataŭ « -ig- » ? Tia uzo de « -iz- » ne kongruas kun ĝia difino en NPIV. Kompreneble, oni ne traktu NPIVon kiel unikan fonton de vero rilate Esperanton. Direndas, ke la romano estas stile iel eksperimenta. Ne estas malbone, kiam aŭtoro iom streĉas la limojn de la lingvo. Declerck ja faras tion, kaj ne nur per malkutimaj neologismoj kaj ne tute NPIVa uzado de « -iz- », sed interalie per modera uzado de la pronomo *ci* — tute nature kaj neniel ĝene —, kaj ankaŭ de la interesa, kvankam pezeta, kunmetaĵo *unuela*, proponata de Eugène de Zilah, ĉefredaktoro de la revuo *La Gazeto*, kiel iuspeca nedifina artikolo Esperanta.

Resume : jen leginda, kvankam stranga, romano. Sed dumlege ne tro konsultu la vortaron. Prefere lasu vin porti de la priskriboj, dialogoj kaj agado. Rapide traflugu la eseajn-predikajn partojn. Vi eble ne bedaŭros la sperton.

[1] Antverpeno, Flandra Esperanto-Ligo, 2008, 207 paĝoj.

[2] Kunlabore kun Deck Dorval (Antverpeno, Flandra Esperanto-Ligo, 1987, 176 paĝoj).

[3] Antverpeno, Flandra Esperanto-Ligo, 2002, 650 paĝoj.

## Romano en la latina

Usona profesoro Stephen Berard ĵus aŭtoris 627-paĝan romanon en la latina lingvo, *Capti* (Kaptitoj). Laŭdire, ĝi estas la unua fikcia verko en tiu lingvo depost jaro 1754. La romano rakontas pri aŭtisma baletisto, kiu vojaĝas de Seattle al Los Angeles por reamikiĝi kun eksedzino. Pli da informoj, angle, ĉe http://www.thestar.com/entertainment/article/1073997--modern-murder-mystery-reads-like-a-true-classic

# Nova ondo da enmigrantoj : Esperantistaj ! *(parto 2)*

***Plusieurs espérantophones ont déménagé à Montréal récemment. Aujourd'hui nous continuons la série d'interviews avec ces nouveaux arrivants.***



(de maldekstre) Deno, Espero kaj Karlo

**En la pasinta numero ni komencis serion da intervjuoj kun novaj enmigrintoj-esperantistoj. Ni komencis per Joel kaj Ĵenja Amis, kiuj venis el Usono al Montrealo fine de 2010, sed kiuj restis la « novuloj » nur kelkajn monatojn, ĉar baldaŭ venis alia paro : Deno kaj Karlo, kiujn ni intervjuas ĉi-numere. (Fakte, ankaŭ ili restis la « novuloj » nur kelkajn monatojn, kaj la samo okazis ankaŭ al la sekva nov-veninto, kiun ni intervjuos en la venonta numero).**

## Rakontu pri vi iomete ! (persone, profesie, familie, Esperante ktp.)

***Dennis « Deno » Drown* :** Kiu mi estas ? Mi ne certas ĉu mi estas artisto enprizonigita en menso de inĝeniero aŭ ingeniero kun koro de artisto. Profesie mi estas komputika programisto ; do mia arto ĉefe temas pri kreado de sistemoj, jen interesaj jen banalaj. Flanke mi ŝatas verki kaj interesiĝas senĉese pri fremdaj lingvoj. Tiu lasta intereso gvidis min al Esperanto en 1996. Necesis malmulte da tempo antaŭ ol mi enamiĝis al nia kara lingvo.

***Carlos « Karlo » González Avila*** estas mia edzo, kaj artisto sen ajna dubo. Lia arto estas kuirado, kaj por li la vivo plej belas en kuirejo. (Fakte li estas en la kuirejo ĝuste nun dum mi verkas tion ĉi.) Karlo esperantistiĝis en 2000, post kiam ni konatiĝis. Kiam mi demandis, ĉu li interesiĝus lerni la lingvon, li senhezite kriis : « JES !! » Li jam delonge aŭdis pri la lingvo, scivolis pri ĝi, sed ĝis tiam neniam konis iun, kiu scipovas ĝin.

Nun, pli ol dekunu jarojn poste, Esperanto estas ĉiutaga lingvo en nia hejmo. Ni hejme parolas ankaŭ la hispanan, ĉar Karlo venas el Meksiko, kaj la francan por ekzerciĝi pri ĝi tie ĉi. Ni neniam parolas la anglan inter ni mem, eĉ se mi estas usonano kaj Karlo flue parolas angle. Tamen se iu demandus al ni, kio estas « nia lingvo », ni ambaŭ rapide respondus « Esperanto ! »

(Mi skribis eke pri ni ambaŭ por ĉesi prokrasti pri tiu ĉi artikolo. Mi devis komenci ĝin por ke vi iam povu havi ĝin finfine en viaj manoj. Post komenco, aferoj povas ekflui, do nun mi proponas, ke Karlo parolu por si mem...)

**Fremdaj lingvoj estas mia pasio. Por mi, havi la eblecon loĝi en franclingva lando estis revo, kaj Montrealo vere estas lingva bufedo**

## Kial vi elektis elmigri el via lando kaj kial vi elektis Kanadon ĝenerale kaj Montrealon specife ?

***Karlo* :** Kanado plaĉas al mi, ĉar, laŭ mia pensmaniero, Kanado estas unu el la superaj landoj en la mondo. Pruvo de tio estas ties politiko, viv-stilo, respektemaj leĝoj, kaj la ekonomia situacio tie ĉi. Montrealo estas la ĝusta urbo por mi, ĉar en ĝi estas multe da historio, diversaj kulturoj, kaj nuntempa, moderna vivo. Mi, kiel eksterlandano, ne venis tien ĉi nur por esti kanadano kaj agi kiel kanadano. Mi venis por partopreni en la granda, bela diverseco.

Al mi ne tiom temis pri elmigrado. Mi ne lasis unu landon por iri al alia. Mi ĉiam estis nomado. Mi loĝis en diversaj landoj kaj urboj. Tiel plaĉas al mi. Sed Kanado ofertis bonajn eblecojn por mi kaj mia edzo. Ni povas civitaniĝi tie ĉi. Tiam mi estos civitano kaj de Meksiko kaj de Kanado. Simile Deno estos civitano de Usono kaj ankaŭ de Kanado. Tiel ni kune estos civitanoj de la mondo.

***Deno* :** Nia ĉefa kialo estis tio, ke Karlo kaj mi rajtas edziĝi en Kanado. Ni fakte havis edziĝan

ceremonion en Usono en 2002, sed tio estis nur por ni kaj por niaj familioj kaj amikoj. La registaro de Usono neniel rekonis nian edzecon. Certe la situacio en Usono pliboniĝas (malrapide), kaj kelkaj ŝtatoj jam havas samseksan edzecon (aŭ almenaŭ ian civilan ligon), sed la lando mem ne rekonas samseksan edzecon. Tio estas ĝeno por multaj usonanoj, sed Karlo ne estas usonano. Li estas meksikano. Se ni estus vira-ina paro, ni povus geedziĝi, kaj li povus post iom da tempo civitaniĝi. Ni tamen estas du-vira paro kaj tial ne povis dependi je lia rajto resti en Usono.



La ĉefkuiristo (Karlo) servas la manĝaĵojn dum la meksika vespermanĝo en MEDO

Malfacilas krei vivon kune kun tia malcerteco pri la estonteco. Kaj Kanado ? Kanado benis nian parecon kaj bonvenigis nin. Tio ja gravegis, sed estis ankaŭ aliaj kialoj. Ni volis eskapi la frenezan, koruptan, konservisman politikon kaj timigan sansistemon en Usono.

Laste : fremdaj lingvoj estas mia pasio. Por mi, havi la eblecon loĝi en franclingva lando estis revo, kaj Montrealo vere estas lingva bufedo. Tie ĉi ni havas amikojn, kun kiuj ni parolas la francan (kompreneble), la hispanan, gestlingvon por surduloj, kaj ESPERANTON !

## Ĉu vi konis Montrealon antaŭ ol vi decidis enmigri ?

***Karlo* :** Jes, mi venis tien ĉi kun mia edzo en 2002 por la mielmonato. Mi sciis tuj, ke tiu ĉi urbo plaĉegas al mi.

***Deno* :** Mi venis du fojojn antaŭ tiu vojaĝo. En 1995 mi laboris por kompanio en Nord-Karolino, kiu havis filian oficejon en Montrealo. Mi vizitis la urbon kaj varbis, por ke ili akceptu min por projekto tie ĉi. Malbonŝance por mi, ili decidis pri kanadano, kiu jam estis en Montrealo. Post tio en 1998 mi venis por la Nord-Amerika Kongreso de Esperanto. Jam de miaj unuaj momentoj tie ĉi, Montrealo allogis min.

## Ĉu Esperantaj aktivaĵoj estis decida aŭ influa faktoro en via decido elekti Kebekion kaj Montrealon ?

***Karlo* :** Iom. Fakte, Montrealo jam ofertis al ni (dum la mielmonato) la eblecon esti aktivaj en la Esperanta mondo. Sed la ĉefaj kialoj por Montrealo por mi estas la beleco kaj grandeco de la urbo.

***Deno* :** Mi ne certas, ĉu tio estis influa faktoro, aŭ nur bela ekstraĵo. En tiu tempo mi ne vere komprenis, kiom aktiva estas la grupo tie ĉi. La ĝeneralan multlingvecon de Montrealo ni certe konsideris. Ni volis esti en urbego en franclingva regiono de Kanado, kaj tiel ni havis nur du elektojn : Montrealon kaj Kebekon. Mi memoris, ke mi iam ekdubis pri Montrealo, ĉar mi zorgis, ke ni tro ofte devus paroli angle. Ni tamen konstatis, ke estus ne nur sufiĉe da franca parolado tie ĉi, sed ankaŭ multe da ebloj paroli aliajn lingvojn, kiujn ni scipovas, inkluzive Esperanton.

## Kiel diferencas E-aktivaĵoj en Montrealo de E-aktivaĵoj en via urbo/regiono ?

***Karlo* :** La diverseco de kulturoj plibonigas la aktivaĵojn tie ĉi. La miksaĵo de kulturoj kaj la diversaj pensmanieroj kaj vidpunktoj igas ĉion pli interesa. En Meksiko estas nur unu kulturo, do ĉio temas nur pri lernado aŭ pri tio, ĉu iu havos eblecon iri al ia UK.

***Deno* :** Ne eblas kompari malsamecojn. En Florido ni ne havis grupon, sed nur unu esperantistan amikon, kiun ni vidis malofte. Kiam ni kuniĝis, ni devis paroli angle plejparte pro lia parulo, kiu ne scipovis Esperanton. Tamen la situacio lastatempe pliboniĝas, ĉar la parulo finfine eklernas Esperanton, kaj nia amiko organizis grupon por la sudo de Florido. Kvankam mi ĝojas pro tio, kio komenciĝas en Florido, mi certe preferus esperantumi en Montrealo.

## Kiuj estis la unuaj esperantistoj, kiujn vi ekkonis en Montrealo/Kebekio ?

***Karlo* :** Normando kaj Zdravka, kaj Mateo McLauchlin, kiu bonege scipovas Esperanton, sed kiu, bedaŭrinde, ne multe partoprenas en la montreala grupo.

***Deno* :** Ni ne forgesu la hundon de Normando kaj Zdravka (la hundo, bedaŭrinde, ne plu estas kun ni). Kiam Normando kaj Zdravka gastigis nin en 2002, tre impresis min, ke tiu hundo komprenas Esperanton. Sed nun Karlo kaj mi havas hundon, kiu bonege scipovas Esperanton. Ŝia nomo estas Espero.

## Ĉu vi jam spertis la lokan vintron ?

***Karlo* :** 2010 estis mia una vintro. Bonŝance, ĝi estis iom milda. Sed antaŭ longa tempo mi loĝis en Ĉikago, Usono, kaj tie spertis tri vintrojn. Dum unu el ili okazis la plej granda neĝoŝtormo en la tuta historio de Ĉikago — 3,5 metrojn da neĝo !

***Deno* :** Ne forgesu, ke Karlo venas el Meksiko kaj mi venas el Florido. Ni investis en varmaj vestoj, kaj ni uzis ilin !

## Kiel diferencas ĝenerale la vivo en Montrealo kaj en via urbo/regiono ?

***Karlo* :** Fakte la vivo tre similas al mia vivo en Meksikurbo. Unue, la urba strukturo ege similas inter la du urboj. La centra parto de Meksikurbo estas tre antikva je pluraj jarcentoj, kaj la malnova urbo en Montrealo pensigas min pri ĝi. Due, dum la sesdekaj jaroj multe da nova teknologio venis el Francio al Meksiko kaj samtempe al Montrealo. Do ambaŭ similas : la antikva kaj la moderna. Estas do facile senti min hejme tie ĉi. Nur la lingvo kaj la (malspicaj) manĝaĵoj estas malsamaj.

***Deno* :** La ĉiutaga kulturo en Kanado ne tiom malsimilas de tiu en Usono. Tiel mi ne vere sentas min en « fremda » lando. Kebekio certe estas iom malpli Uson-simila ol Ontario (kie ni loĝis dum naŭ monatoj), sed la diferencoj estas subtilaj kaj memorigas min pri Eŭropo (kie mi ofte laboris dum kelkaj jaroj). Pro ĉio ĉi mi sentas min agrable hejme en Montrealo, foje eĉ pli hejme ol en mia denaska lando.



Dum Esperanta semajnfino en Tririvero

## Kiom longe vi studis la francan antaŭ ol veni ?

## Ĉu estis sufiĉe facile alkutimiĝi al la kebekia franca ?

***Karlo* :** Mi neniam studis la francan. Mi lernis surstrate, kiam mi estis knabo, sed mi ne uzis ĝin dum multaj jaroj. Nun mi ja studas ĝin. Kaj jes, pli malfacilas la franca en Kebekio kompare kun la franca, kiun mi lernis antaŭe.

***Deno* :** Mi elektis studi la francan en liceo nur pro tio, ke mi ne povis studi la germanan. (Mia avino venis el Germanio.) Tamen ekde la unuaj klasoj mi ŝategis la francan, kaj ĝis tiam mi ĉiam provis iel igi la lingvon parto de mia vivo. Tio estas multe pli facila en Kebekio ol en Usono. Tamen, jes, mi foje devas strebi por kompreni la akĉenton kaj esprimojn tie ĉi.


## Rakontu, se dum via restado ĉi tie okazis io interesa/amuza/nekutima !

***Karlo* :** Ĉu ĉiuj rigardas min kiel strangulon?!? Mi tiel pensas ĉiam. Kanadanoj ŝategas nigrajn vestojn. En mia kulturo oni portas nigrajn vestojn nur kiam iu mortis aŭ kiam oni volas esti kvazaŭ nevidebla. Do kiam mi eniras en metrotrajnon aŭ aŭtobuson, aŭ kiam mi iras en vendejon aŭ restoracion, kie estas multe da personoj, ĉiuj haltas kaj rigardas min kvazaŭ mi venus el alia planedo, nur ĉar mi surhavas kolorojn. Nun mi ekalkutimiĝas esti marsano. Sed mi neniam alkutimiĝos surmeti nur nigrajn vestaĵojn.

***Deno* :** Nia vojaĝo al Montrealo estis iom malrekta, ĉar ni devis loĝi iom da tempo en Otavo antaŭ ol veni tien ĉi. Montrealo ekde la komenco estis nia celata loko, sed ni enmigris pere de la federacia sistemo. Kebekio estas la ununura provinco en Kanado, kiu havas propran enmigran sistemon. Se iu uzas la kebekian sistemon, estas devige loĝi en Kebekio, almenaŭ ĝis oni havas sian karton de konstanta loĝanto. Je la federacia sistemo estas la malo : oni rajtas loĝi ie ajn en Kanado krom en Kebekio, ĝis kiam venas tiu beata karto. Kiam ni komencis la proceduon, mi pensis, ke oni donus al ni la kartojn tuj ĉe la landlimo. Poste mi konstatis, ke temus pri monata atendado por ĝi, do, ni planis resti nur monaton en Otavo antaŭ ol iri al Montrealo. Fakte, ni bezonis du monatojn kaj duonon por ricevi niajn kartojn. Tiu tempo sufiĉis por ekhavi hejmon en Otavo, kaj ni decidis, ke tre tedas movi ies vivon de unu loko al alia. Tial ni decidis atendi ĝis la frua printempo por la fina translokiĝo. Retrorigardante mi kontentas, ke ni loĝis en Otavo dum tiuj naŭ monatoj, ĉar tio donis al ni la eblon koni alian provincon kaj ankaŭ la belan ĉefurbon de Kanado.

Nun finfine ni estas en Montrealo, kaj inter multege da amikemaj esperantistoj. Malfacilas klarigi, kiom ni ĝojas pri tio.

**Estis interesa mencio pri Esperanto en la retpaĝo de usona esplor-instituto New England Complex Systems Institute : nokton post la anonco pri la morto de Steve Jobs, do, inter la 9a vespere kaj 9a matene (laŭ la amerika orienta tempozono), estis du milionoj da pepaĵoj (tweets), kiuj enhavis la vortojn « Steve Jobs » (sur la bildo, ĉiu punkto reprezentas mil pepaĵojn). Do, Esperanto estas post la japana kaj turka, sed antaŭ la germana, kaj la ĉina eĉ ne eniris en tiun ĉi bildon !**




http://necsi.edu/news/2011/jobstribute.html

# Kiel traduki ?   Comment traduit-on ?

***Voici une rubrique que nous reproduisons du mensuel de SAT-Amikaro,* La Sago*. Nous les remercions et espérons que vous saurez apprécier.***

**Ekde nun *La Riverego* publikigos rubrikon prenitan el la gazeto de SAT-Amikaro, *La Sago*. Ni kore dankas ilin por la permeso uzi ilian rubrikon.**

La vorto ***pièce***, kiu devenas de gaŭla vorto signifanta terpecon, alprenis en la franca lingvo tre diversajn signifojn, proprajn kaj figurajn. Ĝi ofte tradukiĝas per ***peco***, kiu ankaŭ ricevas figurajn sencojn, sed en multaj okazoj alia traduko estas pli internacie komprenebla.

■ Ni konsideru unue la okazojn, kie tiu vorto indikas parton de io pli granda.


| | |
|---|---|
| Découper une pièce dans du cuir. | **Detranĉi pecon el ledo.** |
| Un emporte-pièce sert à découper d'un seul coup des pièces de forme déterminée. | **Ŝtancilo (aŭ premtranĉilo) uziĝas por eltranĉi figurojn per premo aŭ frapo.** |
| Il porte des jugements à l'emporte-pièce. | **Li faras tranĉajn juĝojn.** |
| Il s'est tellement mis en colère qu'il a mis en pièces son verre. | **Li tiel koleris, ke li dispecigis sian glason.** |
| Il a taillé les ennemis en pièces. | **Li disvenkis la malamikojn.** |
| Des fruits vendus au poids ou à la pièce. | **Fruktoj vendataj laŭpeze aŭ popece.** |
| Cela coûte dix euros la pièce. | **Tio kostas po dek eŭroj por peco.** |

| | |
|---|---|
| On a le temps, on n'est pas aux pièces. | **Ni havas sufiĉe da tempo, ni ne popece laboras.** |
| Les pièces d'une collection. | **La pecoj de kolekto.** |
| Un costume trois pièces: veston, pantalon et gilet. | **Tripeca kompleto de vesto: jako, pantalono kaj veŝto.** |
| Un maillot de bain deux pièces. | **Dupeca bankostumo.** |
| Cet éleveur a cent pièces de bétail. | **Tiu bredisto posedas cent brutojn.** |
| Les pièces d'un jeu d'échec. | **La pecoj de ŝakludo.** |
| En héraldique, les pièces sont des figures géometriques | **En heraldiko, la pecoj estas geometriaj figuroj.** |


Reĝo
Ĉefa peco

Damo, Turo
unuarangaj pecoj

Kuriero, Ĉevalo
duarangaj pecoj



*En fakaj ŝakludaj tekstoj, oni nomas pecoj ĉiujn pecojn krom la peono.*



Bendo

Paliso

Kapo

Kruco

Trabo

Ĉevrono

*En heraldiko, la unuarangajn figurojn oni nomas «honoraj pecoj»*

■ En dua grupo da frazoj, la vorto indikas pli sendependan objekton; la limoj inter tiuj du grupoj estas iel arbitraj.

| | |
|---|---|
| Cette pièce de terre est déjà labourée. | **Tiu terpeco estas jam plugita.** |
| Il a dans sa cave dix pièces de vin. | **Li havas en sia kelo dek barelojn da vino.** |
| Il y a dans mon parc trois pièces d'eau. | **En mia parko estas tri basenoj.** |
| Le marchand de tissus a acheté une pièce de soie. | **La teksaĵisto aĉetis rulon da silko.** |
| Au repas de noces, il y avait une pièce montée. | **En la nupta manĝo estis turkuko.** |
| Un deux pièces cuisine, avec une chambre et un séjour. | **Duĉambra apartamento, kun kuirejo, dormoĉambro kaj vivoĉambro.** |
| Une pièce de cinq euros. | **Monero je kvin eŭroj.** |
| Donner la pièce à un serveur. | **Doni trinkmonon al kelnero.** |
| Présenter des pièces d'identité. | **Prezenti identigilojn.** |
| Apporter des pièces justificatives. | **Alporti pruvopecojn.** |
| Le juge observe les pièces à conviction. | **La juĝisto observas la konviktajn montraĵojn.** |
| Juger sur pièces, sans se rapporter à autrui. | **Juĝi mem laŭ la faktoj, sen dependi de ies opinio.** |
| Envoyer un courriel avec des pièces jointes. | **Sendi retmesaĝon kun (al)ligitaj dosieroj.** |
| Il a écrit diverses pièces de vers. | **Li skribis diversajn versaĵojn.** |
| Ils ont joué une pièce instrumentale. | **Ili ludis instrumentan pecon (aŭ muzikaĵon).** |
| Une pièce de théâtre peut être une comédie, une tragédie, etc. | **Teatra peco (aŭ teatraĵo) povas esti komedio, tragedio, ktp.** |
| Faire pièce à quelqu'un. | **Rebati iun.** |
| Je lui rendrai la monnaie de sa pièce. | **Mi repagos al li pro lia malbonfaro.** |

■ En tria grupo, ankaŭ iel arbitra, troviĝas ekzemploj, kie la vorto ĝenerale montras iun komponanton.

| | |
|---|---|
| Les pièces d'une machine. | **La pecoj de maŝino.** |
| Des pièces de rechange. | **Vicpecoj.** |
| Acheter une machine en pièces détachées. | **Aĉeti maŝinon en la stato de komponantoj.** |
| Mettre une pièce à un pantalon. | **Alfliki pecon al pantalono.** |
| L'obélisque est tout d'une pièce. | **La obelisko estas el unu sola ŝtono.** |
| Cet homme est tout d'une pièce. | **Tiu viro neniam ŝajnigas.** |
| Un raccomodage fait de pièces et de morceaux. | **Divers-peca flikaĵo.** |
| Il a inventé cet appareil de toutes pièces. | **Li tute inventis tiun aparaton.** |

☼ Mi konfesas, ke mi ne tute inventis la frazojn de tiu artikolo.

**www.sat-amikaro.org**

La SAGO
La Sat-Amikara GazetO

## Venu al la Decembra Festo !

La jara Montreala Decembra Festo okazos vendredon 16an de decembro 2011, ekde la 17-a horo (ATENTU, ni devis ŝanĝi la anoncitan daton), en restoracio Le Commensal, sur la TRIA ETAĜO. Okazos por la vespermanĝo, kantado en Esperanto de kristnaskaj kantoj, donaco-ludo, babilado, muziko, libropremioj kaj multe pli. Pretigu ion, venu amuziĝi kaj vi certe ĝuos la vesperon. Por partopreni la donacludon, kunportu bele pakitan donacon — ion kio ne plu utilas ĉe vi, sed kio povus utili al iu alia — aŭ aĉetu ion sub la valoro de 5 $. La partopreno en la donacludone estas deviga, sed preferinda.

# Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

| Tago | Dato | Horo | Loko | Temo |
|---|---|---|---|---|
| Vendredo | 16a de decembro 2011 | (ekde) 17 h | Commensal (3 et.) | 152-a datreveno de L.L. Zamenhof |
| Vendredo | 13a de januaro 2012 | 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo | 27a de januaro 2012 | 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo | 10a de februaro 2012 | 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo | 24a de februaro 2012 | 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo | 9a de marto 2012 | 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo | 30a de marto 2012 | 19 h 30 | MEDO | Irlanda vespermanĝo (alportu ion!) |
| Vendredo | 13a de aprilo 2012 | 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo | 27a de aprilo 2012 | 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo | 11a de majo 2012 | 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo | 25a de majo 2012 | 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo | 8a de junio 2012 | 18 h* | MEDO | Kolumbia vespermanĝo (alportu ion) |
| Vendredo | 14a de septembro 2012 | 18 h* | Commensal | Jarkunveno de ESK |
| Vendredo | 28a de septembro 2012 | 19 h 30 | MEDO | Japana vespermanĝo (alportu ion!) |
| Vendredo | 12a de oktobro 2012 | 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo | 26a de oktobro 2012 | 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo | 9a de novembro 2012 | 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo | 30a de novembro 2012 | 19 h 30 | MEDO | |
| Sabato | 15a de decembro 2012 | 18 h* | Commensal (supre) | 153-a datreveno de L.L. Zamenhof |

**Noto : manĝo je la 18-a , babilado ekde 19 h 30**

**Commensal St-Denis** (restaurant végétarien — rue Saint-Denis) : 1720, rue St-Denis (entre Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »), Montréal. http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint_denis.

**MEDO (Montreala Esperanto-Domo)**: 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

# Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

| | |
|---|---|
| 19-21a de majo 2012 : 9a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto) | Kebeko, Kebekio |
| 22-25a de junio 2012 : Landa Kongreso de Esperanto-USA | Dalaso, Usono |
| 28a de julio - 4-a de aŭgusto 2012 : Universala Kongreso de Esperanto | Hanojo, Vjetnamio |
| 5-12a de aŭgusto 2012 : Internacia Junulara Kongreso | Tenri, Japanio |
| 6-8a de oktobro 2012: ARE | Silver Bay, NY |
| 18-20a de majo 2013 : 10a MEKARO | Otavo, Ontario |
| 17-19a de majo 2014 : 11a MEKARO | Granby, Kebekio |
| *provizore:* 12a MEKARO (2015) : Toronto (Ontario) ; 13a MEKARO (2016) : Sherbrooke (Kebekio) | |

***Bonvenon al MEKARO en Kebeko !***
***19-21a de majo 2012***



**Esperanto-Societo Kebekia**
**Société québécoise d'espéranto**

**La Riverego** *estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.*

***Redaktado kaj grafiko :*** *Yevgeniya Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca).* ***Korektado kaj lingva konsilado :*** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. ***Estraranoj de ESK :*** *Normand Fleury (prezidanto), Ian Wheeler (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Den Drown (konsilanto).*

**Limdato por la venonta eldono /**
**Échéance pour le prochain numéro : 2012.2.20**

**La Riverego** *(Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.*

***Rédaction et graphisme :*** *Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca).* ***Correction :*** Sylvain Auclair et François Lorrain. ***Administrateurs de la SQE :*** *Normand Fleury (président), Ian Wheeler (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseilère), Dan Drown (conseiller).*

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8**
**info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à **riverego(à)esperanto.qc.ca**

**Service de librairie postale à Montréal**

**La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.**

***Service de librairie postale à Montréal***

*Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.*

www.esperanto.qc.ca/katalogo

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8
(Vidu retejon por vidi kiel atingi)
*(Voir site web pour un plan d'accès)*

*Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo*
*Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement*

## Pasporta Servo

**Aliĝu tuj se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi : www.pasportaservo.org. Vi povas ankaŭ kontakti Ĵenja Amis (yevgeniya.amis(ĉe) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.**